



**4(149)**  
**2014**

# Apudvistula Bulteno

de Krakova Societo ESPERANTO

**Bultenon redaktas:** ĉiuj anoj de Krakova Societo ESPERANTO,  
**Adreso por korespondi:** str. Sokolska 13, 31-515 KRAKÓW

Geraldo Mattos

## Krakova inspiro

Afliktas min la verko de poemo  
ĉe difinita dato, mi cerbumas,  
dum nekutima hela suno lumas,  
kaj min ne helpas per la don' de temo...

Afable ordonitan, mia ĝemo  
ĝin pensas naski, dum la aŭtoj zumas,  
kaj ne inspiras min, kaj mi konsumas  
la tempon, kaj grandiĝas mia tremo.

Sopire mi rigardas al la urbo,  
ĝis baras min la horizonta kurbo,  
sed nun de ĉio venas la komando.

Pri l' homoj versu, kies koroj batas  
per verda lingvo, ĉar vi ĉi konstatas,  
ke nur homoj estas ĉia lando!

*Krakovo, 25.04.1994.*

## Renkonto

Ĉe ombra flekso de la vivostrato,  
haltinte en la marŝo, mi atentis,  
ĉu ia homo ĉirkaŭ mi ne sentis  
la dornoplenan ungon de la fato...

Vi kuris do al mi, mizera frato,  
kaj, antaŭ mia, via ĝem' silentis:  
per plendaj voĉoj kune ni lamentis  
pri nia sorto, inda de kompatato...

Nun, sur la marĉo naŭza kaj dolora,  
naskiĝas vigle tiu arda flamo  
kaj nutras sin el la pasi' fervora!

Nun por la larmoj trovas sin balzamo,  
ĉar sufokiĝas dum la kis' adora,  
la granda ĝemo en pli granda amo!

## el Taktas vivo

Sen fuĝi de ĉi tiu, mi kreos mian teron,  
kaj metos ĉion tie kaj murdos ĉion, kio  
nigrigas mian tagon kaj lumas la vesperon  
kaj min priŝtelas ĉiam de la malmulta mio:

lum' kaj tenebro, samaj en tim' kaj energio,  
ĉar vidi arbon lume, kaj ombre, nur desperon  
trudas al ni konstante, en turnoj de nenio,  
kapablaj por mezuri destinon kaj ĥimeron...

MI volas maron nudan de plaĝo, bark' insulo:  
la nuran premargoron de vento kaj nebulo  
sen kajo por eliri kaj varfo por alveni...

La mar' de vivo: suno en pruo sen gvidmapo,  
kun vosto de kometo remanta al fora drapo,  
kie la semo putras en la dezir' poleni!

## Lasta verso

Mi volus fari verson pli dolĉan, pli teneran,  
kaj meti en ĝian sinon la fluon efemeran

de birdoj, la koloron glacian de jasmeno,  
la lulon de la fonto, la ĝojon de mateno;

ornamente mi ĝin garnus per riĉe per laj rimoj,  
en kiuj varmaj pensoj fajrerus kiel glimoj.

Mi legus ĝin mildvoĉe, proksima al viaj haroj,  
kaj mi meditus dume pri vervaj amdeklaroj

kaj eble mi sukcesu de via frostrigido  
vin puŝi re al amo, vin treni re al rido...

Prof. d-ro GERALDO MATTOS GOMES dos SANTOS, 82-jara, eksa prezidanto de Akademio de Esperanto, lingvisto, specialisto pri portugala lingvo, filozofo, emeritita profesoro de Federacia Universitato de Paranao kaj de Pontifika Katolika Universitato de Paranao – PUCPR, iama prezidanto de Paranaa Esperanto-Asocio mortis la 23-an de marto 2014.

Li estis signifanta persono por esperantistoj, estante prezidanto de Paranaa Esperanto-Asocio kaj aŭtoro de multaj sciencaj disertacioj pri Esperanto, sed precipe alte taksis lin krakovanoj kaj poznananoj. En la jaro 1994 li lekciis pri la portugala lingvo en Jagelona Universitato en Krakovo kaj samtempe partoprenis en la kluba vivo de krakovaj esperantistoj prelegante pri la E-lingvo. Ankaŭ li prezentis siajn prelegojn dum Esperantaj Tagoj de Krakovo kaj dum Esperantaj Tagoj de Staszów. Septembre 2002, la profesoro lekciis dum interlingvistikaj studoj en Lingvistika Instituto de Adam Mickiewicz-Universitato en Poznano kaj dum Arkones.

Krom la scienca agado li okupiĝis pri E-literaturo verkante multajn tekstojn, precipe poeziajn. Li publikigis i.a. volumojn: La tento de la junulo (1953), Ivan la Sesa ( teatraĵo, 1953), La Nigra Spartako (rakonto, 1955), Miniaturoj (japaneskaj poemoj, 1959), Arĉoj (sonetaro, 1967), Ritmoj de vivo (poemoj, 1968), La servorajto, La sinmortigo (dramoj 1997), Barbaraj sonoj kaj sonetoj (poemaro, 2000), La bona pineto (infanrakonto 2008), Vivogumo (novelo, 2010), krome fabeloj por infanoj kaj pluaj poemoj.

*Redakcio de AB*

Geraldo Mattos

## **Koncepto pri literaturo**

Se ni dividas la homan aktivecon inter scienca kaj arta aktivaĵoj, ni devas konsideri, ke la simpla uzado de lingvo estas arta aktivaĵo pro tio, ke la parolataj kaj skribataj frazoj estas ordinar absolute originalaj, escepte de multaj esprimoj – tamen kelkaj, se ni rigardas al la infiniti de la originalaj! – tradicie samformaj, uzataj necese por striktaj sociaj bezonoj. La literaturo devenas evidente de la homa aktiveco pere de la lingvo, sekve jam pro tio arta, sed devas esti bone distingata de la parola (peto de informo) kaj skriba dialogoj (skribo de letero). Tio devas porti nin al la ideo pri utilocelaj kaj ĝuocelaj artoj.

Medicina estas utilocela arto, dum pentado estas ĝuocela arto: la celo de la pentrado estas la primitiva ĝuo de la propra artisto, kaj tion bone pruvas la tuta kariero de Van Gogh.

La unua karaktero eble estas tio, ke literaturo implicas laboron ne nur pere de la lingvo, sed krome kaj precipe super la lingvo. Sekve de tio literaturisto egalas al skulptisto, kiu laboras ne nur pere de rokerio, sed krome kaj precipe super la rokerio: li prenas rokeron, kaj tiun je sia tuta bontrovo li detajlas. Kaj ĝuste pro tio, la literatura laboro progresigas la lingvon, kaj ĝia ekzisto estas do esenca por la disvolvado de naskiĝanta nova idiomo.

La dua karaktero certe konsistas el tio, ke la literaturo estas sia propra celo en tiu senco, ke ĝi taŭgas por nenio krom la elverŝo de diktatora mensaĵo, kies eliro produktas tian malpezigon, sekvatan de tia malpeziĝo, ke la verkinto ĝuas... Medicinisto povas rezigni sian medicinon, sed vera artisto tion ne povas, ĉar li freneziĝus... Kompreneble, duan fojon li ĝuas, se li sukcesas eldonigi sian verkon! Kaj trian fojon li ĝuas, se estas multaj vendoj... Eldono kaj vendo tamen ordinar ne estas la unua celo de artisto. Spite de tio dirita supre, la leganto estas integra parto de la literatura proceduro, kaj tio konsistigas la trian karakteron de la literaturo. Cetere ĉiu verko havas minimume unu leganton, kiu estas mem la verkinto! Se ne estos legantoj, estos literaturo, sed perdita pro netrovebleco.

Estas tamen tre delikata la linio, kiu disigas paroli (utilocela arto) de deklami (ĝuocela arto) kaj skribi (utilocela arto) de verki (ĝuocela arto).

## Memore al Eleonora Bartula

2.11.2013 j. forpasis en Krakovo la sindonema kaj kara samideanino ELEANORA BARTULA. De multaj jaroj ŝi fervore agis en la krakova esperanta movado. Ŝi naskiĝis 30. 09. 1924 j. en Nowy Żmigród apud Jasło, en Malalta Beskido. Translokiĝinte al Krakovo ŝi komencis labori en Zoologia Instituto kiel tajpistino. Ŝi estis anino de Krakova Klubo de Ŝaradistoj, al kiu ankaŭ apartenas ŝia filino Krystyna.



Ŝi esperantistiĝis en 1946 j. agante en Asocio de Polaj Esperantistoj kaj pli poste en Krakova Filio de Pola Esperanto-Asocio. Ŝi plenumis diversajn organizajn taskojn i.a. Ŝi estis bibliotekistino, estraranino en Krakova Filio de AEP/PEA, membro de Revizia Komisiono. Ŝi aktive partoprenis en laboroj rilatantaj al diversaj kunvenoj kaj porokazaj solenaĵoj. Kiel sperta ŝaradistino ŝi gvidis interesajn lingvajn ludojn en la esperanta klubo. Ŝi ankaŭ apartenis al aktivuloj de la katolika esperanta movado partoprenante en laboroj de Katolika Intelektulara Klubo.

Eleonora Bartula vizitadis multajn esperantajn aranĝojn lande kaj eksterlande, i.a. UK-ojn en Varsovio (1959; 1987) kaj en Sofio (Bulgario, 1963) kaj kelkfoje popularan feriadon „La Ora Pola Aŭtuno” en Międzygórze apud Bystrzyca Kłodzka, ankaŭ Esperantajn Tagojn de Staŝovo.

Depost februaro 1984 j. ŝi aliĝis al la Krakova Klubo de Veteranoj kaj Senjoroj-Esperantistoj.

Dum la XXIV-a Tutpollanda Kongreso de Esperanto okazinta en Krakovo (23-30. 08. 1986) lige al la 80-jara jubileo de Esperanto en Krakovo ŝi estis distingita per „Ora Honora Insigno de PEA – Meritoplena Esperantisto”. Post reakiro de la malnova historia nomo de 1906 j. – Krakova Societo ESPERANTO anstataŭ Krakova Vojevodio Filio de PEA (24. 03. 1995), ŝi senprokraste aliĝis al agado de la renovigita organizaĵo.

*Redakcio de AB*

## XXVIII Esperantaj Tagoj de Krakovo

Ĉi jaraj Esperantaj Tagoj de Krakovo okazis en 30.05, 31.05 kaj 01.06, organizitaj kiel kutime de Krakova Societo ESPERANTO. Ili kongruis kun la festa solenaĵo de la 650-a datreveno de Jagelona Universitato, unu el la plej malnovaj universitatoj en Eŭropo. Historion de la Jagelona Universitato rememorigis en la instruiga referaĵo Lidia Ligeza. Esperantaj Tagoj de Krakovo ĉiam havis ambicion prezenti kulturon kaj arton de nia medio, oferante al ĉeestantoj proprajn akiraĵojn kaj novajn atingojn. Same okazis ankaŭ nune. Dum du kaj duono da tagoj daŭris diversajn programerojn, intense plenigante la tempon destinitan al ni de la Kulturdomo Podgórze kaj Shinoda-Kuracejo. Ni havis okazon travivi la poemon de Karol Wojtyła (Johano Paŭlo la II-a) „Roma Triptiko” tradukitan bonege de Lidia Ligeza kaj prezentitan de profesia aktorino Anna Ramza-Kozioł. La interesiĝon vekis referaĵoj de Robert Kamiński pri 98-a UK-o en Rejkjaviko kaj pri ZEO-j lande kaj eksterlande. Ankaŭ kun plezuro ni rigardis fotojn el la fama salminejo Wieliczka prezentitajn de Andrzej Sochacki kun komentario de Magda Tatara, profesia ĉiĉeronino. La ampleksa teksto kun la kantoj dediĉita al Wiera Gran, fama kantistino el la juda geto, rakontita de Tomasz Chmielik vere impresis la publikon. Adam Łomnicki kaj Andrzej Feuer el diametre diferencigitaj pozicioj okupiĝis pri didaktikaj procezoj. Magda Tatara, ĉi-foje kiel instruitino de Esperanto, prezentis al la publiko provlecionon por la baza kurso. Andrzej Kołpanowicz interese parolis pri diversaj aspektoj de koloro ne nur en la pentroarto. La juna gimnaziano Tobiasz Kubisiowski rakontis pri kontaktoj inter esperanta junularo. La dimanĉa antaŭtagmezo la gastoj pasigis en Shinoda-Kuracejo, kiu aplikas japanan metodon masaĝi. Ĝia direktoro, d-ro Włodzimierz Opoka rakontis pri historio de la centro. La geedza paro Markéta kaj Adam Wilkus havis okazon sukcese prelegi pri la 73-a Hispana kaj la 18-a Andaluzia E-Kongresoj kaj pri „niaj subĉielaj vojaĝantoj” – birdoj.

La artistan parton de la programo plenigis du signifajn eventojn: Kantoj de Mordeĥaj Gebirtig tradukitaj esperanten de Mikaelo Bronŝtejn kaj en jida lingvoj kortuŝe plenumis la konata krakova kantistino Irena Urbańska, al kiu akompanis piane Jacek Bylica. Tomasz Chmielik

kun verŝo kaj vigleco proksimiĝis al la publiko personon de Mordeĥaj Gebirtig, fama popola poeto kaj bardo dum la tuta vivo kunligita kun krakova, juda kvartalo Kazimierz. La dua evento estis la koncerto de du junaj artistoj, gefratoj Kołpanowicz, Julia (violono) kaj Joachim (piano), kiuj post interpreto de komponaĵoj de Liszt, Mozart kaj Ravel estis varmege aplaŭditaj.

La tutan aranĝon logistike prizorgis Grażyna Porada helpe de Alicja Sacha.

Krakovo, unu el centroj de eŭropa kulturo, eksa ĉefurbo de Pollando allogas ĉiujare miloj da turistoj el la tuta mondo. Senĉese okazigas la kulturifesto kun granda nombro da ekspozicioj, koncertoj kaj amasaj aranĝoj. Des pli ni dankas al niaj fidelaj esperantistaj gastoj, kiuj elektis nian modestan programon ol samtempe realigata „granda parado de drakoj” ĉe rivero Vistula, apud la reĝa kastelo Vavelo.

*Andrzej Kołpanowicz*

## **Adiaŭo de Maria Rybacka**

La 15-an de majo 2014 forpasis post longa malsano MARIA **RYBACKA**, nia longjara kolegino, anino de Rondo de Esperantistoj en Krzeszowice.

Maria Wiesława Rybacka naskiĝis en Krzeszowice la 16-an de januaro 1931 kiel filino de Wanda Śliwińska kaj dr-o Edward Rybacki, apotekisto kaj urbestro de nia urbo. Dum multaj jaroj kiel instruistino de muziko ŝi laboris en la Ŝtata Muziklernejo en Krzeszowice. Ŝi instruis ritmikon, gvidis lernejan koruson, transdonante al la junaj edukitoj propran grandan pasion, kiu nomiĝis muziko.

Ĉiam nekutime modesta, perfekte edukita, afabla kaj samtempe tre postulema klerigis multajn generaciojn de infanaro. Ŝi tre bone konis literaturon, historion de arto, la francan lingvon. Ŝi konis ankaŭ Esperanton. En jaroj 2001-2006, kiel anino de la Rondo de Esperantistoj en Krzeszowice kreis kaj gvidis 7-personan koruson „Najbarinoj”, kiu multfoje kun sukceso elpaŝadis antaŭ esperantista publiko dum diversaj okazintaĵoj. Pri sukcesoj de „Najbarinoj” informis inter alie „Heroldo de Esperanto” kaj „Litova Stelo”.

La rekviemo kaj entombigo de la kormemora Maria Rybacka eventis en Krzeszowice, la 19-an de majo 2014, pri kio kun tristo kaj bedaŭro ni sciigas.

*Rondo de Esperantistoj en Krzeszowice*

## **Krakova Societo ESPERANTO**

### **La programo de la renkontoj aprile, majo kaj junio 2014 j.**

- 3. 04. – Lidia Ligęza. **Kiel dono de la mano. Pri traduk-antologio de Asocio de Polaj Literaturistoj en Poznań**
- 10. 04. – Grażyna Porada. **La esperantaj lingvaj ludoj**
- 24. 04. – Marta Michałowska. **La nuntempaj vizitoj en la Ĉielo.**
  
- 8. 05. – Grażyna Porada. **La esperantaj lingvaj ludoj**
- 15. 05. – Lidia Ligęza. **La esperantaj interjeksioj**
- 22. 05. – Andrzej Feuer. **La plej novaj mnemoteknikaj versaĵetoj**
- 29. 05. – **La organiza kunveno antaŭ XXVIII-aj Esperantaj Tagoj de Krakovo.**
  
- 5. 06. – Grażyna Porada. **La esperantaj lingvaj ludoj**
- 12. 06. – Lidia Ligęza. **Pri verboj ankoraŭfoje**
- 26. 06. – **La societa renkonto antaŭ la libertempo**